



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 10 Oktobro, 2012

Kara Leganto! Ni, la redakcia teamo, havas grandan plezuron denove prepari por vi mallongan raporton pri la lastaj okazaĵoj en nia E-kolektivo, en Ŝikago, Usono kaj entute en la E-mondo. Eble, vi rimarkis similajn strebojn de la lasta (septembra) numero de nia periodaĵo, hodiaŭa numero estas mala – pli literatura, dank’ al verkisto Gregoro Dolgin, kiu entreprenis longan flugon al Kalifornio kaj revenis sana kaj plenigita de multaj planoj kaj ideoj. Ni ĉiam kun granda nekaŝita intereso legas lian verkadon. Kaj ĉu ankaŭ vi?

Dankon al niaj multaj gesamideanoj, sendintaj riĉenhavajn bultenojn de siaj E-kolektivoj (Milano, Beogrado, Gotenburgo, Kebekio), Informilon de ĝemelaj urboj, literaturajn eldonojn (Penseo, el Magdeburgo) ktp. Ili estis transseditaj al vi. Dankon denove.

Nun ni iru al Kalifornio kaj al virtuala Esperantio. Ek!

–La Redakcio

Laŭ centra Kalifornio



Meze de l’ aŭgusto mi ricevis inviton de mia parenco, loĝanta nun en Kalifornia urbo San Ĥose (65 km. sudoriente de San Francisko). Li renkontis min la 29-an en San Franciska flughaveno kaj veturigis per sia aŭto laŭ rapid-ŝoseo, kiu estas plen-glata, kiel silko, ĉar pro foresto de neĝo

kaj glacio oni ne uzas korodi-agreseman salon por superŝuti ĝin. Tial aŭto-rapideco laŭ sama ŝoseo konsistigas ĉirkaŭ 70 mejloj/hore.

Jen la fama Silicia valo, kie koncentriĝis la plej gravaj firmaoj de altnivela teknologio. Kronas ĉi valon urbo San Jose (pr. ĥose), kiun ornamas montĉenoj, dividas du altaj kaj larĝaj digoj por preventi tiun ĉi urbon kontraŭ ne oftaj, tamen fortegaj diluvoj. Helkoloraj, prefere kvaretaĝaj domoj surprizas per eŭropa, mediteranea arkitekturo. Tamen tio, ankaŭ belimpresaj: «Roma Kolizeo» en Wisconsin Dells, «Piza Turo» en Chicago, imitado de eŭropaj palacoj en Las Vegas – ĉu ne strangas? Do, mia rigardo min turnis al ties puraj stratoj, laŭ kiuj impetas tramoj kaj ne multaj aŭtoj. Ĉe iliaj randoj altiĝas palmoj, cipresoj, aromas citrusoj kaj ruĝflorantaj arboj, devenantaj el Aŭstralio. Ni observis pitoreskajn ĉirkaŭaĵojn, vizitis kafejojn kaj vendejojn.

Preskaŭ tuj post la alveno, uzinte Jarlibron-2006, mi telefonis al Kaliforniaj esperantistoj. Kvinfoje mi provis kontakti kun ili, sed respondis nur diversaj aŭtomat-voĉoj en la angla: «Leave a message». Mi ne volis eksperimenti: homo plus roboto, ĉar pro pasintaj 6 jaroj ajnan el ties numeroj povis posedi alia persono. «Provu ankoraŭ nur foje», – decidis mi kaj tuj ekaŭdis voĉon vivan. Korekta esperanto-lingvaĵo sonis por mi kiel simfonio kaj ne nur samideane, sed ankaŭ kiel alvoko de dume ne konata parenco.

Sekvamatene ĉe San Franciska stacidomo min renkontis li – Aleksandro Gofen kaj tuj proponis observi la urbon. Baldaŭ en lia moderna aŭto ni supreniĝis al du montpintoj, nomataj neoficiale «Twin moms» (vere aspektantaj kiel du junvirinaj mamoj). Ĉi «mamoj» anstataŭ lakto nutris min per siaj du ŝtonetoj. Preskaŭ tuta San Francisko kun la oceana golfo kaj du grandegaj pontoj vidiĝis de ĉi tie, kvazaŭ el fluganta aviadilo. Post la tagmanĝo ni daŭris ekskurson laŭ ties urbocentro. Dankesprime mi donacis al Aleks kompleton de kvar miaj libroj kaj la sondiskon «The best music for dance», parte en nia kara lingvo, t. e. kun esperanto-muzikaĵoj, koncertitaj julie 2005 kadre de UK-90 en Vilno (Litovio). Ĉirkaŭ la 6a vespere mi estis liverita al stacidomo.

Sabate, la 1-an de Septembro duope kun la parenco ni veturis al Pacifika oceano. Mi imagis ĉi vojon penetran tra montfendejo kaj tuneloj. Sed ĉi itinero serpentumis supren kaj suben, laŭ kiu ekvilibris aŭtoj kaj riskemaj, senhezitaj biciklistoj. En la arbaro vidiĝis gigantaj sekvojoj, grim pantaj kaj falintaj aliaj arboj. Pacifika oceano, malvarma ĉi tie eĉ somere, aspektis tute ne paceme. Jen rifoj kaj rokoj ĉe kiuj tondris senfinaj ondofrapoj. Jen brunaj algoj, marsteloj kaj kraboj, forĵetitaj surborden. Bruis la ondoj, alarme kriis kormoranoj...

«Kia karesema Atlantiko renkontis min antaŭe ĉe Florida! – ekspiris mi. – Aĥ, paradiza Florida»... Revenis ni, superiginte ambaŭdirekten distancon de 160 km.

Sekvatage, dimanĉe ni atingis perpiede la plej sudan bordon ĉe San Franciska golfo, tien kaj reen ĉirkaŭ 12 km. Lunde mi ripozis. Marde mia parenco veturigis min al sia laborejo, montris al mi parton de l’ teritorio. Ĉi-regione antaŭ kaj post la tagmanĝo mi ekskursis mem. Dum lastaj tri tagoj, atendante mian parencon ĝis lia reveno hejmen, mi sole vagadis laŭ stratoj kaj skvaroj de San Ĥoseo, ĝuis varman, sunan veteron.

«Adiaŭ por ĉiam!» – malĝaje prononcis mi al Pacifika golfo, preterglitinta sub la aviadilo. Mi estas konservatema. Mi estimas Atlantikon kaj amas maron Mediteranian. Post kvar horoj, en Ĉikaga flughaveno O’ Hare min renkontis mia filino...





P.S. La 21-a de septembro, ĉirkaŭ la 10a matene mia parenco feliĉe kaptis momenton por foti kosmoŝipon Shuttle, proksimiĝantan al sia lasta (muzea) haveno en Silicia valo (laŭ permeso de l' fotisto mi proponas ĝin al E-bulteno Saluton!).

–Gregory
S. Dolgin

170 000 artikoloj en la E-Vikipedio

Tagmeze de la 20-a de septembro (laŭ eŭropa tempo) la E-Vikipedio atingis 170 000 artikolojn. Ĝi nuntempe tenas la lokon 27 inter la diversaj vikipedioj, antaŭ ekzemple la dana, serba, litova kaj hebrea versioj. Ĉiuhore estas ĉ. 10 000 paĝorigardoj ĉe la Esperanto-versio de la tutmonde konata vikipedio. Laŭ la ofteco de uzado Esperanto okupas lokon 41, apud la tagaloga, estona kaj hinda versioj.

Vikipedio bone montras kiel eniras Esperanto en la modernan tempon, komune kaj samrajte kun aliaj lingvoj. Indas memori, ke antaŭ la ekesto de Vikipedio ekzistis neniu ĝenerala Esperanto-enciklopedio, kaj la pri-esperanta Enciklopedio de Esperanto venis el la jaro 1934.

La E-Vikipedio tiurilate ne estas unika projekto - Esperanto dum la pasintaj jaroj ekhavis tradukojn de Facebook, Mozilla Firefox, ĝi estas traduklingvo de Google Translate, kaj ĝi eniris per pli ol 180 000 frazoj la multlingvan frazokolekton Tatoeba, kie Esperanto tenas nun la duan lokon post la angla. Antaŭ 125 jaroj Esperanto havis la plej malgrandan lingvo-komunumon inter pli ol 6 000 lingvoj; hodiaŭ ĝi okupas kutime lokon inter la 15a kaj la 50a ĉe diverskriteriaj listigoj de la internacie videblaj lingvoj.

–Libera Folio



E-Android

La poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj kiuj uzas la operacian sistemon Android baldaŭ aŭtomate havos Esperantan klavaron. La klavaro laŭplane estos integra parto de la versio 4.2 de Android, aperonta komence de la jaro 2013. Jacob Nordfalk, dana programisto kiu grave kontribuis al la enkonduko de Esperanto en Android, opinias la decidon grava, interalie ĉar Esperanto nun aŭtomate estos videbla en la listo de eniglingvoj. Male ol la operaciaj sistemoj de iPhone kaj iPad, la sistemo Android jam de multaj jaroj permesas facilan tajpadon de Esperanto en ĉiuj programoj. Ĝis nun por uzi tiun eblon tamen necesas instali unu el la alternativaj klavaroj, kiuj subtenas Esperanton. –Libera Folio



Korespondi Deziras

Duncan McDonald el Melburno, Aŭstralio sercxas iun kiu ŝatus regule korespondamikon kun li. Li estas 40-jara seninfana relativa komecanto: duncanmcdonald@optusnet.com.au; twitter: @Bunzabar

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

23an de Oktobro – tradukista horo: traduko de propraj nomoj – analizo de 7 diverslingvaj versioj de G. Orwell “Animal Farm” (V. Pajuk)

26an de Novembro – Uzbekaj novaĵoj de Andreo Kolganov

16an de Decembro – Zamenhofa Festo en Fiŝista Nesto